

# Estlanda Esperantisto.

Oficiala organo  
de

Revela Esperantista Grupa.



Propaganda gazeto  
de la

lingvo internacia Esperanto.

Abonprezo: 1 rbl. jare (ekster Rusujo: 1 Spesmillo 10 Sd.); kun enskribo en societo: 1,50 rbl. (1,60 Sm.

Redaktaro-administranto: J. A. Rahamägi, Revel, Weike Kalamaja uul. 7, k. 2.

Nr. 3—4.

Marto—aprilo 1908.

1-a jaro.

**Enhavo:** Lugejatele. [Al legantoj]. — Silmapilgu ndudeb. [La postuloj de momento]. — Al nia propra suno. Novelo de Sr. Mikkelson. — Herooj? Skizo de T. O. — Kalevala-Esperanto. — Esperanto en Estlanda. Esperanto Gëstimaal. — Esta Esperantistaro. — Esperanto Soomes. [Esperanto en Finlando]. — La kuara kongreso esperantista. Neliäs Esp. rantistide kongress. — Ringwaade. [Kroniko]. — Anonceloj. Esperanta gazetaro.

Al tiu numero estas kunmetata cirkulera letero de Konstanta komitato pri teatra prezentado de Dresdena kongreso, kaj postkarto por mendo de biletoj.

## Lugejatele.

Kolmat korda tuleb „Estlanda Esperantisto“ Tete ette; seelord küll märkja hiljatsjädmult, aga selle eest ka tahelordjes suuruses. Wiitõimise põhjusteks olivad ehteks, et lehe wäljaandmise luba saamine palju kauem aega kulutas, kui esialgul arwatud; siis ka trükkija harjumatus täitsa mõera keele labumisel. Müüd on teisi tähtsustesi üle jõutud ja järgmised numbrid wõiwad korralikult ilmuda. Toimetus püüab ka kõik teha, mis tema wõimuses seisab, et leht hõwitawaks saaks ja lugejate tarwidust täidaks.

Müüd on aga tähtsam osa Esperanto sõbrade teha. Isestisam propaganda ajakiri on rahwuswahelise keele ante edendamiseks ja jõudude kogumiseks wõdga mõjur. Aga senine tellijate hulk ei suuda veel lehe trüki ja paberi kulust praegusesgi suuruses ära tasuda; lehe suurendamisest, mida toimetuse ja wäljaandja, Tallinna esperantistide grupe, soowiwad, ei wõi juttugi olla. Selleks peab iga tellija veel wähemalt ühe uue tellija juurde muretsema. Seameelega rõhendamise kirjanuduskirje oja, sealstme keeleharjutajate jaoks ka isedraalise jaostonna sisse ja mõnda muud; aga seltsi waraline jõud ei luba suuremate kulude peale wälja minna. Toetagu igaüks! Mida rõhkem iga aatesõber tõdtab, seda kiiremalt jõuab rahwuswahelise keele aade wõidule, seda karmemalt hakkab ta igaühele rõhket tegeliski kasu saatma.

Aga mitte ainult aineliselt toetust, ka w a i m l i s t a b i tahame saada. Mida suurem kaastõdliste ring, seda mitmekessemaks, seda hõwitawamaks wõib lehe sifu kujuneda. Tõdole siis kõik!

## Silmapiigu nõuded.

Ühels kõigesuurematest kahtlustest, mida kunstilise rahvusvahelise keele vastu avaldatakse, on see: Kust teie teate, et nimelt teie poolt kuulutatud keel, meie juhtumisel teega Esperanto, üleilmiliseks keeleks saab? Kas ei või tema kõrmas teist kunstlikku keelt tõusta, mis teada ära tõrjub, ehk tema tarvitamise piiri kitsendab? Kas ei või Esperantoga samasugune lugu juhtuda, nagu omal ajal „Volapükiga," mis esiteks küll laialdast ojarõõmist leidis, aga pärast Esperanto eest taganema pidi ja nüüd peaaegu unustatud on? Võiks ju ette tulla, et iga paarikümne aasta tagant uut „ilmakeelt" õppima peab.

See kartus on nii mõjuv, et ta suure hulga neist, kellel aate heaks töötamiseks mahti ei ole, kes aga rahvusvahelise keelest rohkelt kasu saada võiksid — nimelt äri ja teaduste ilmas — asjast eemale tõrjub. Paarikümne aastane propaganda hakkas juba umbusaldust valgitama, aga nüüd tõuseb ta uue sõuga. Põhjust selleks oma jagu ongi; ja neile, kes asja eemalt vaatlavad, näib põhjus väga mõjuvaks.

Uute rahvusvahelise keelte loomise katsed ei ole kunagi raugenud — viimase ajal ei ole aastat läinud, kus mitte 2—3 uute keelte projekti poleks avaldatud; ühikuteist muudatustest, mis Esperantos ette võidta soovitakse, kõnelemata. Suurem osa neist katsetest ei ole laialdasemat tähelepanemist võitnud, ja õnnelikult on nad kõrvale tõrjutud, ilma et nad suurt segadust rahvusvahelise keele propagandas luua oleks suutnud. Asi oli nii, et need — peale lihtsamaks tehtud „Volapüki," mis „Idiom neutral" nime all ilmale tuli — enamasti poolikud katsed, ühikute põhjused teie kujutamised on, ilma iseseisva poolehoidjate ringita, ilma kõnelejateta, ilma kirjanduseta. Üksnes „Idiom neutral" suuts omale kuus korda aastas ilmuma ajakirja ja mõned sõnaraamatud soetada; aga teada muudetakse alalõpmata, nii et kindlust ei tundu.

Viimase aasta jooksul kasvas uute projektide hulk silmanähtavalt — nimelt selle mõjul, et „Rahvastevahelise abi keele valimise delegatsioon" oma tööga otsustavale silmapilgule lähenes ja iga uue mõtte hõuduja igatse, et tema nimi tulevase rahvastevahelise keelega ühendusse jääks. Kõige nimetamisewäärilised uute katsete seas on nõndanimetatud „Ido" ja „Antido" projektid, mis Esperantot mõnel, õige kaugel minewal kombel muuta tahavad. Nende ja hulga muude ettepanete uute najal nõudis delegatsioon Esperantos mitmeid muudatusi. Et aga „Lingva Komitato," mis esperantlaste rahvastevahelistel kongressidel keele edenemise järele valvamiseks seaiud, delegatsiooniga kokkuleppimisele ei jõudnud, hakkas delegatsioon oma projekti „Esperanto simpligita" (lihtsamaks tehtud Esperanto) iseseisvalt välja kuulutama ja asutas selleks eri ajakirja „Progreso," mille toimetajateks delegatsiooni sekretärid Leau ja Couturat on. Delegatsiooni keeleprojekti kirjelduse ja arwustuse tahame ligemas numbris tuua, seekord aga ütlen mõne sõna seiskorra kohta, millesse rahvusvahelise keele propaganda sattunud.


Silmapiik on põnev. Esperantlastel langewad tahte tuurde leeri: ühed soovivad praegu lohe põhjalikkust uuendusi ette võtta, keelt kas mõi täiuseni wia; teised jälle kindistavad, et meie keel ei ole enam niisugune asi, milles järsku muudatusi teha saaks, ja loobuvad, et elu ise keelt täiendab. Rahvastevahelise keele aate wastastes parastawad ja kuulutawad meie propagandale peatset hukkaminiemist ette.

Ünnetts on aga rahvusvahelise keele aade niikaugelt selgunud ja wälja kujunenud, et ta igasuguse wälise kallaletippumise wastu seista wõib. Iga esperantlase lohus on aga, kallaletippumisi wõimalikult mõjufalt tagasi lüüa.

Weel kahelümne wiie aasta eest usuti, et ilma keelt wõib täitsa wabalt luua; tarwis aga grammatika oma tahtmist mõõda kujutada ja sõnastik wabalt walida, nagu pater Schleyer „Dolapüti“ loomisel tegi. Páris tõesti, „Dolapüti“ farnatseib „ilma“ keeli wõib tuhandeid sünnitada, üksteisest ifka isefuguseid. Hoopis teine lugu on aga rahwastewahelise läbikäimise keelega. See peab sealt alguse saama, kus teda kõige enam waja, kus läbikäimine kõige suurem, s. o. Europa kultura-riingtonast. Seal on aga rahvuswaheline keel juba olemas — määratu hulk kultura-sõnu on Europa suurematele keeltele ühised, niisama ta grammatikalised põhjuswõrmitid. Rahvuswaheline keel, mis kultura-maadel wastuwõtmist leida tahab, ei tohi seba ühtlust tähelepanemata jätta. Tõti ütelda, o l e m a s j a w õ i m a l i k o n ü k s a i r u s r a h w a s t e w a h e l l i n e k e e l, k ö i f „keeled,“ mis juba olemas — Esperanto, Ido, Antido, Ibiom neutral jne. — on ainult üfsitud katsed sellesama sihi poole ligtsemiseks; mõni on neist üsna eesmärgi juurde ulatanud, teised seifawad laugemal; mõni katse õnnelikum, mõni õnnetum. Määratu oja neil keelteil on täitsa ühine, nii et ühe keele oskaja teistest tingimata aru saab,\* ja wastastifune arusaamine on ja rahvuswahelise keele cinumas otstarbe. Praegu juba wõib ütelda: k ö i f r a h w u s w a h e l i s e k e e l e k a t s e d, m i s e e s m ä r g i l e l ä h e n e m a d, o n n a g u ü h e k e e l e m u r r a k u d, seifawad üksteisele niisama ligidal nagu näit. üfsitud Eesti keele murded. Aja jooksul, kui läbikäimine neid wiilida jõuab, kujunewad nad weel palju farnatsemaks ja elu ife walmistab neist wõimati üleüldise ilmakeele.

Sellepärast ei ole meil mingit põhjust meelt heita, kui uus rahvuswahelise keelest ilmub. Ei ole ka waja nende wastu waenlust awalbada; igalüks neist kannab ju oma kivilise wastastifuse arusaamise hooone ehitamiseks. Aga meil ei ole ka mingit põhjust, enda propaganda tööd seisama jätta, sellepärast nagu ei oleks Esperanto weel kõige täielikum kõigi rahvuswaheliste keelte seas. Juba praegu toob ta rohket kasu, hõlbutab igasugust läbikäimist üfsitude rahwaste wahel, ja lubab ante wäljakuulutamist. Ainult lehasatud aade wõib wõidule peafeda — eberdame Esperanto oskamist; sellega latendame rahvuswahelise keele walda, ja jätame tulewiku hoolets, misisuguses kujus ta seda ksimust lahendada tahab. Esperantost kaugele ei wõi ta minna. Agaralt siis propagandaale.

J. M. Kašmági.



## Al nia propra suno!

Novelo de Fr. Mihkelson.

Estis kredeble grandegaj ondoj, iam herbruante superversintaj teron kaj poste mal-	te ebenaj kaj senarbaraj kampoj kaj herbejoj . . .
Tie-ĉi kreigiĝis silantemaj montetoj, tie profundaĵ valoj kun bluaĵ lagoj,	Dormetante la vento naĝas super vasta ebenajo. Dormeme moviĝas pajleroj en

\*) Inĝlitemaal ilmub tónamu qjaliti „Korespondens internasional“, mifles iga linjatult isisuguses rahvuswahelise keele murraus kirjutatud. Neist kõigist arusaamine ei lähegi waga taseks.

aero kaj bruetadas noktan kanton. Bluaĵ val-lagoj rigidaj, similaj al vitro, spegulas nur blankajn sekajn nubojn kaj frangolojn, virinajn alnojn, rampantajn sovaĝajn vin-berujojn, kreskantajn sur ĝita bordo. Tie sur lagbordoĵ marsadas junuloj longharaj, legante Testamenton, kaj sidas knabinoj junaj, piaj kaj delikataj kiel anĝeloj, kaj kantadas pri amo — amo al Dio.

Sole sur altaĵ pintoj de fer-montoj la kolereza ventego bruegas kaj tondras, kaj pinoj ĝemadas, kurbigante teren. Kaj tie kreskadas viroj, kvazaŭ faritaj el ŝtalo, kaj virinoj instruadas geknabojn ardege ami, ardege malami. Starante sur pintoj de siaj feraĵ montoj ili klare kaj libere vidas fortikan fluadon de vivo; kaj altaĵoj de iliaĵ montoj ruĝiĝas je sunleviĝo jam longe, kiam malsupre en la valo ankoraŭ la densa mallumo reĝas, kaj la strigoj kaj vespertoj ankoraŭ flugadas.

Sed silente kaj mallaŭte estas ĉio en la ebenaĵo. Tie oni legas Testamenton kaj kantas himnojn al Dio; tie oni pendigas homojn kaj mortas je malsato.

Silente kaj mallaŭte estas en la ebenaĵo.

Tamen, inter ĝemoj de mortantoj kaj inter melodioj de poetoj sonoras mirindaj fabeloj. Rakontoj pri erarintaj homoj, difinitaj naskiĝi sur montoj, sed ekvidintaj taglumon en ebenaĵo. En iliaĵ animoj troviĝas montoj, altaĵoj. Se la tuta mondo sur la senkaraktera ebenaĵo estus droninta en si mem, se ĉiuj erikejoj kaj kampoj estus plenaj de pendigiloj, se la ĉielo estus mallumigita per fumo ofera de pastraj — eĉ tiam la altaĵoj en iliaĵ animoj brilas, kaj ili predikadas novan vivon al ĉiuj blindaj kaj paralizitaj.

Parteton el unu fabelo mi scias, kvazaŭ strofon de longa kanto, havanta nek komencon, nek finon. Ĝi estas rakonto pri heroo de feraĵ montoj, naskita en la dronanta ebenaĵo.

\* \* \*

Ĉe rando de ebenaĵo, en alnaro sidis junulo kaj knabino, ĉirkaŭpreninte sin, kaj rigardadis urbon, super kiu jam la vespera nebulo flugetis. De tie atingis ilin voĉoj, kriantaj kaj ĝemantaj. Malproksimen la voĉoj disnaĝadis en aero kaj estingiĝis en dormanta alnaro. Ili biovetis malgajecon kaj malĝojon en malvarmetan aŭtunan aeron, kaj ĝi premadis brustojn kvazaŭ muelŝtono. Animo deziregis eldiri fon, sed tio perdiĝis en senkaraktera vastaĵo kaj rigidiĝis en brusto, fariĝante mallaŭta ĝemo.

„Aŭskultu, kiel ili triumfas!“ diris knabino.

„Kaj kiel ili ĝemas!“ respondis junulo, montrante per mano urbon.

„Mirinda estas ĉio: tiu aŭtuna ĉielo, kurantaj nuboj, blua malvarmeta aero, tiu alnaro kaj ni...“ pensis knabino laŭte kaj movigis manon en aero, kvazaŭ intencinta montri lon.

„Kaj la kruĉigitaj dentoj en urbo tie malsupre... la vizaĝoj de mortantoj... la koto kaj ŝlimo kaj la griza malsato...“ daŭrigis knabo, rigardante severe teren.

„Kial vi ĉiam parolas tiel serioze kaj sobreme? Almenaŭ kelkajn solajn minutojn ni povus do sonĝi per malfermitaj okuloj pri nia fluganta vivo? Mia kara, mia karulo...“

Kaj virino ĉirkaŭprenis kolon de junulo.

„Sonĝi — se ni sen tio ĉiam sonĝad- as?! Kion signifus niaj momentaj sonĝoj ĉe tiu granda tutmonda dormado?! Ĉu vi ne supozas, ke ĝi penetras eĉ niajn kapon kaj bruston? Ĉu vi ne vidas, kiel ĉiafoje, kiam ni amanto rigardas unu la alian, la diaĵo de dormo levas siajn brakojn benante super ni? Ĉiu minuto, kiun ni donacas al ni mem, estas oferita al dio de dormemo.“

„Ĉu ni ne rajtas doni lam fon al ni mem? Eĉ unu momenton? Ĉu eble, mia amato, mia karulo?“

Demandante tiel la knabino rigardadis ebenaĵon.

„Dont al ni mem — ni, ricevintaj ĉion de aliaj?! Nur pro tio, ke ekzistas aliaj, ni estas fariĝintaj tiuj, kiuj ni estas. Kaj ni devas ĉion rekompenci al societo, eroj de kio ni estas, kaj helpi ĝin atingi celon difinitan por ĝi.“

„Tiam estus pli bone, se ni tute ne ekzistus,“ ekridetis knabino.

„Ha! kiun malsagajon vi diras!“

Kolere skuis la viro kapon kaj ekrigardis supren per duonfermitaj okuloj, ĉe tio lon kalkulante kaj pripensante.

Ankaŭ la knabino ekvidis flugantaĵn aŭtunaĵn nubojn kaj sonĝis pri la multkolora kaj kanterna. Mallongan tempon ambaŭ silentis. Poste la knabino ekdiris mallaŭte, premante kapon de junulo sur sian apenaŭ kurbigantan, elastikan bruston:

„Ni foriru el tiu brueganta urbo, mia karulo. Ni foriru tien en valon, inter jenaj montetoj. Tie ni konstruos domon por ni, kaj vivos tie duope, mia kara, mia sola. Rigardu“ — ŝi mentris per mano direkton — „kiel verdas tiuj altaĵoj! Kaj verda herbo estas printempon trasemita per blankaj floretoj, simile al stelriĉa ĉielo! Tien ni konstruos domon — sur deklivo, kie frangoloj kreskas. Antaŭ domo fonteto fluetas valen...“

„Silentu, ĥo amuzuleto!“

Kaj la junulo glatis orkolorajn harojn de knabino.

„Ni sidados ĉe tiu fonto sub frangolo, rigardos tra flavaj folioj la mallumetiĝantan ĉielon, ĝis la steloj ekbrilos. Poste, ĉe la plena krepusko, ni leviĝos ĉirkaŭpreninte nin sur tiun verdan monteton, rigardas tien, kie la rebriĉo de elektraĵ lampoj ĉielon rozkolorigas, kaj diros unu al alia:

„— Rigardu, en tiu leonkaĝo loĝadis ni iam...“

„Ne parolu pri tio, karulino! Neniam fariĝos tio, neniam!“ petis junulo, suferante premante dentojn.

„Kaj mi diros:

„— Mia amo, vidu kiel feliĉaj ni estas,

donante tutan vivon al ni mem. Kion koncernas nin fabrikoj, kion elektro... kion ĉio, ĉio, per kiu oni povas turmentti kaj alkruciĝi homojn?! Ni vivu nur por ni mem, mia kara, mia sola...“

„Kaj vi respondos:

„— Mi eĉ ne supozis, ke mi vin tiel amas, ke mi sentas grandegan fajron brulantan en mia brusto, kaj okuloj miaj disjetigas fajrerojn, rigardante vin. Ni vivu por ni solaj, mia kara, mia sola...“

Ekscitite la junulo stariĝis, faris kelkajn paŝojn kaj rigardis exploreme malsupren, sur urbon, kies turoj briladis ankoraŭ en oro de malleviĝanta suno. La rebriĉo de sunradioj falis eĉ sur koleraĵ vangoj de knabo. Liaj longaj, malbinditaj haroj ruĝiĝis; en okulo aperis akra lumero.

La virino staris antaŭ li kvazaŭ preĝante, dum la strioj de timo kuradis sur ŝia vizaĝo. Ŝi vidis junulon viŝintan frunton per mano, kaj opiniis rimarki elektraĵn fajrerojn, saltantaj el liaj haroj sur manon. Kvazaŭ ensorcita ŝi rigardis viron, kaj eĉ kunmetis manojn.

Knabo rigardis ankoraŭ sur urbon, surde krakantan dentojn kaj ĝemantan kvazaŭ en sonĝo. La turoj kaj okcidentaj muroj estis fajrkoloraj, la longaj vicoj de fenestroj brilegis. Malproksimaj antaŭurboj perdiĝis en blua nebulo, leviĝanta malrapide el rivero kaj disvolvanta sian kovrilon. La ĉielo post urbo estis nigra. Nur en zenito dormetis kelkaj malgrandaj nuberoj, kvazaŭ forgesintaj celon.

La vento aŭtuna brueganta estis silentinta vespere.

La vango de junulo brulis. Suno fortrante kisis lian junan frunton.

„Kion vi pensas?“ demandis la knabino tremante.

„Kion mi pensas? Se vi volus kompreni tion!“ — Li viŝis denove frunton.

„Mi meditas pri vasta vivo, bruenta kvazaŭ sekreta fabelo antaŭ ni, kaj restanta por ĉiam nekomprenata. Ankoraŭ mi me-

ditas pri idealoj de homaro kaj pri sonĝoj de juneco, aperantaj kvazaŭ fantomoj en ĉielon de nia vivmateno. Mirinda estas miaj pensoj — milflugilaj, brilaj kaj radiaj — ili flugas super mia kapo. La kapo zumas, la sango bolas kaj ondas... ventegoj bruadas kvazaŭ sur okeano...

Li rompís folion de alno kaj malrapide disŝiris ĝin en strioj.

La knabino ekstaris, kaptis manon de junulo kaj kilnigís tre proksime al lia vango.

„Ai mi vi ne povas esprimi viajn meditojn — ĉar mi ne komprenus?“ demandis ŝi.

„Paroli al vi pri pensoj, serĉantaj batalon kaj brulon? Al vi, sonĝanta ankoraŭ dometon sur deklivo kaj klaran fonton? Sonĝanta pri du homoj, vivantaj kvazaŭ kolomboj en tiu dometo kaj manĝantaj brogitaĵn terpomojn?“

„Ne, tute ne — kiam mi diris tion? Sed tamen — serĉadi kvietan vivon mi opinis. Feliĉon esperis mi trovi en paco, la amon — en sonĝema krepusko. „La feliĉo do estas movado, transformiĝinta en ripozon...“ esprimis iu. Ankaŭ mi pensas simile. Sed vi serĉas feliĉon en ventego, volegas ekvidi fajron sur akraĵo de glavo... Tie migradas viaj opinioj...“

„Ĉiam la persona feliĉo!“ ridetis junulo. „Rompana, nigra ventego ne donas feliĉon — nek al vi, nek al mi.“

„Kaj tamen vi serĉas ventegon?“

„Ne, mia karulino, trans ventego troviĝas, kion mi serĉas. Nur mian ripozon serĉas mi trans ventego. De prapatroj heredas ni oron kaj famon, sed socian situacion kaj ordon, konformajn al ni, devas ni mem almilili. Ĝin heredi de gepatroj oni ne povas. Ankaŭ tio, kion mi serĉas, estas feliĉo, estas kvieteco, estas movado fariginta ripozo. Morta estas la societo, opinianta ke ĝi heredís sian situacion de gepatroj, kaj ne serĉanta novaĵn ideojn post ventego. La epokoj de dormado estas, se oni penas nur teni, kion

oni jam havas. La nuna gento kredas esti heredinta pacon. Sed mi esperas iun alian. Ni oniru ventegon, kaj almititu per batalo pacon por ni!“

Malrapide promenis ili sur kampabedo. La junulo estis metinta manon sur ŝultron de knabino, kaj rigardis serioze malproksimen, en mallumecon, elrampantan kvazaŭ milkapa drakono post turoj de urbo, kaj disvolvintan siajn flugilojn, similajn al tiuj de stringo, super tuta ĉielo.

„Kaj por tio eniros vi ventegon?“

„Por tio, pro tio!“

„Kaj vi esperas trovi pacon?“

„Mi trovas ĝin. Sed venontaj post ni ne povas kontentiĝi per venko de nia gento. Ili penetros siavice ventegon ĉe lumantaj torĉoj de iliaj ideoj, kaj batalados kaj venkos. Tiu estas vivo.“

„Kiel mirinda... kvazaŭ fabelo...“

„Tre simpla, senpoezia...“

„Sed homoj, ne serĉantaj en juneco siajn ideojn malproksime, kontentaj kun depatra heredaĵo —“

„Ili — ili estas malfruiginta naski. Ila tempo estis, kiam la pasinta gento vidis sian celon malproksime, brilantan en matena lumo. Kontraŭ ili ni ekbatalos — ni, junaj, fortikaj, fortegaj! Niajn ideojn ni levos super niaj Junaj kapoj, ĝis niaj vicoj brulas kaj lumas kvazaŭ fajraj kolonoj meze en malluma nokto, kaj tiel ni iros — levigante kaj mallevigante — antaŭen, ĉiam antaŭen!“

„Antaŭen, antaŭen!...“ murmuretis knabino: „antaŭen, antaŭen... en lumo de niaj ideoj... al nia propra suno... antaŭen, antaŭen...“

Ili staris sur vasta kampo: unu — bolanta per juneca kredo kaj forto, preta por batalante fari novan vojon; la dua — plena je mirego kaj senkonscia timo antaŭ novaj ideoj, bruantaj en aero ĉirkaŭ ŝi. Kaj ili staris sur vasta kampo; kaj la vespero kovradis ilin per siaj flugiloj. La suno estis malleviginta; ia milkapa dra-

kono rampadis ĉielen. Tamen ili staris, serĉante vojojn por estonteco.

„Vi iros do urbon, en ĝian ventegon?“ demandis virino.

„Jes, tien mi iros.“

„Tien, en malvarman, senkoran urbon, glutontan vin kvazaŭ malliberejo . . . vi, postulanta de ĝi amon . . . Tiam ni devas marŝadi ĉiam kiel ŝtonegoj — tiel malvarmaj, malvarmegaĵaj . . . Ni sidu, karulo, ankoraŭ lom, antaŭ ol ekiri . . . Ankoraŭ minuton da sonĝado, feliĉon ankoraŭ . . .“

Ili sidĝis ĉe alna arbetaro proksime unu al alia

„Mia kara, mia sola! . . .“ murmuris knabino, premante kapon sur vangon de junulo kaj metante manon ĉirkaŭ lia kolo: „karesi kaj dorloti volas mi vian dispremotan kapon, kie loĝadas nigraj zorgoj kaj multpezaj vivpensoj . . . Se mi havus forton por forkisi tiujn ĉi sulkojn de via frunto kaj forpeli viajn nigrajn zorgbirdojn!“

La knabo lace kliniĝis kapon sur virina brusto kaj fermis okulojn.

„Mia kara, mia sola!“ paroletis knabino: „glati, karesi volas mi vian kapon, lacan jam en juneco — lacan de via laboro kaj batalado . . . Ĉu vi memoras, kiam mi ekkonis vin? Estis printempo, kaj sur via kapo aperis la unuaj grizaj haroj — en aĝo dekokjara. Vi estis mal-

varma, defia, kolera, laca pri vintra malvarmo kaj pri laboro. Nun alvenis aŭtuno, sed la grizaj haroj estas malaperintaj . . . Ĉu vi memoras, vespere ni venadis tien ĉi vastajen promenadi, kaj proksime starante unu al alia ni sonĝadis ĝis mallumigo . . . kaj vi metis vian kapon sur mia brusto kaj mi glatadis viajn harojn . . . poste ni ambaŭ ridis, ĉar tio estis malsaĝa kaj infaneca . . . Nun estas aŭtuno, kaj vi volas ree jeti vin en vivon. Ili atendas vin, ili havas do katenojn por vi . . . tamen vi iros tien en leonan hejmon . . . Mia kara, mia sola . . .“

Ambaŭ silentadis, eĉ unu vorton ne parolante. En la brakoj de mallumeco ili fariĝis kvazaŭ unu korpo.

Subite ekblovis forta vento tra vastaĵo kaj jesis kelkajn brunajn alnfoliojn sur haroj de junulo.

„Finita estas la sonĝo!“ diris la viro kaj ekstaris rapide.

„Finita la sonĝo . . .“ ripetis knabino tremante: „la fabelo estas finita . . .“

Baldaŭ marŝis ili, tenante sin per manoj, tra dezerta ebenaĵo, kaj antaŭ ili, meze de grandega mallumeco ĝemadis urbo, havanta centmilojn da brilegantaj okuloj.

Supre la steloj tremetis . . .

El esta lingvo J. A. Rahameĝl.



## Herooj?

Oni diras, ke herojoj, heroegoj estas batalantoj sur la kampo de l' milito kaj venkintoj en kelkaj bataladoj; ĉar mortu aŭ venki en la milito faros do faman inter ĉiuj. Vidi la morton antaŭ okuloj, sed tamen konservi kuragon, nepra estas kvalito de bravulo. Pri militistaj herojoj oni kantas laŭdkantojn, skribas famajn historiojn; por ili oni konstruadas monumentojn kaj memoregnojn, longe ili vivadas en me-

moro de popoloj — kvankam iliaj laboroj kaj penoj daŭris ofte nur kelkajn tagojn.

Proksime de ĉi tiuj trovigas aliaj bravuloj, kiuj neniam estas satataj herojoj, kvankam ili dum tuta vivtempo estis en buĉo de morto, kvankam ili portadis multegon da penoj kaj multegon da mizero, kvankam ankau ili havis en sia brusto koron kuragan. . .

Jen tiu kuragulo; malriĉa laboristo, la plej


malkonata kaj tamen la plej alta inter ĉiuj herooj. Ĉiam lin turmentas malriĉo kaj malsato; ĉiam lin sargas zorgo pri infanoj, pri edzino, pri multaj aliaj: ĉiam per malsanoj timigas lin mano de l' morto. Lia vivo estas ĉama suferado, kaj neniam lumigos gin radio de espero al pli bona, pli bela estonteco. Tamen li ne plendas, kaj ne malesperas. Ĉiutage li eliras por labori, kaj lacigas sin ĝis malfrua vespero.

... Kun ĉama mizero kaj tento li bataladas; por riĉigi aliajn eĉ malsaton kaj morton li ne timas. Lia koro ĉiam estas sentima kaj de la celo difinita li neniam flankiĝas.

Ĉu li ne estas tuda por havi titolon: heroo?

Granda estas la kulpo nia, ĉar ni englutas eĉ honoron de malriĉulo! Ĉiam oni predikas justecon -- kaj ĉiutage oni vivas en maljusteco.

T. O. . . . uu.



## Kalevala-Esperanto.

Sub tiu titolo la „Finna Esperantisto“ presigas en sian decembran numeron (1907) artikolon, pritraktantan gravecon de Esperanto kiel lingvo, en kiun oni devus traduki ĉefverkojn de la monda literaturo. Unufoja traduko Esperanten faros certe iun verkon pli facile atingebla al la tutmonda inteligentularo, ol multaj tradukoj en naciaj lingvoj. Gravajn malfacilaĵojn por traduko prezentas precipe la popola literaturo (kantoj, proverboj, fabeloj) de nacioj, kiuj, simile al finna kaj ankaŭ al esta, ne apartenas al la tielnomita indo-germana lingva familio. Sed eĉ li estas vonkeblaj. Kiel pruvo la aŭtoro de citata artikolo, s-ro A. A. Sola, donas komencan de „Kalevala“, finna popola epopeo, en Esperanta traduko. Sukcese estas trafitaj la ritmo kaj dirmaniero de popola poezio. Jen tiu traduko:

1 Animo mia estas ema,  
cerbo mia certe pensas  
nun komenci la kantadon,  
entrepreni recitadon,  
5 laŭte la poemojn gentajn  
kaj la familiajn kanti;  
fluiĝas vortoj el buŝ' mia,  
frazoj vige elfaladas,  
venas sur la langon mian,  
10 al la dentoj amasiĝas.  
Frato kara, kamarado,  
mia bela kunkreskinto!  
Nun komencu kun mi kanti,  
kune rekte recitadi,

15 alian unu renkontinte,  
el du direktoj alveninte;  
ni malofte renkontiĝas,  
al la saman lokon venas  
en ĉi-tiuj limaj landoj,  
20 malfavoraj nordaj landoj.

Ni la manojn tuj kunkroĉu  
kaj la fingrojn interligu,  
por ke bonajn kantojn soni  
ni nun lasu, plej bonegajn;  
25 tiam aŭdas amikaro,  
lernas ĉiuj karaj gastoj  
en generacio juna,  
en popolo pli kreskanta  
tiuĵn memorindaĵn vortojn  
30 kaj poemojn, ricevitaĵn  
de la zon' Vājnāmōjnen,  
el forĝeĵ' de Ilmarinen,  
de la glava pint' de Kaŭko  
kaj pafark' de Joŭkahajnen,  
35 de plej postaj Pohja'j agroj  
kaj de kampoj Kalevala'j.  
Ilin kantis patro mia  
dum hakiĵenilon tranĉis,  
la patrin' lernigis ilin  
40 dum ŝpinilon ŝi turnadis,  
dum mi kiel infaneto  
ĉirkaŭi ŝi sur planko vagis,



kiel ido laktan barbon,  
acidlaktan buŝon havis.  
45 Vortoj mankis ne al Sampo,  
nek al Louhi sorĉesprimoj:

kun vortoj maljunigis Sampo,  
perdigis Louhi kun sorĉaĵoj,  
Vipunen ĝis morto kantis,  
50 Lemminkäinen petoladis.

## Esperanto en Eŝtlando.

### Revela Grupo.

En marto finiĝis kurso, kiu havis sukceson. La estintaj kursanoj kontinuas varme interesigri pri lingvo internacia: ili diligente ekzercadas, legante kaj vizitante ĉiuvendredajn kunvenojn de grupo. La profito de ĉi-tiuj kunvenoj estas evidenta: la kapableco paroli kaj la elparolado de la grupanoj montras rapidan progreson.

Dum lasta tempo inter la grupanoj fariĝis laŭta la deziro — fari ekskurson en Finnlandon, por viziti la tieajnsamideanojn. Ekskurson oni intencas aranĝi dum Pentekosto, la 1.—3. (14—16.) junio, vapoŝipe en Helsingfors'.

El laboro de komitato dum januaro ĝis marto ni citu sekvantan:

1. Estas komencita interrilato kun Esperantista Centra Oficejo en Parizo kaj kun librovendejo Möller kaj Borel en Berlino, por ricevi de ili regule novaĵojn en Esperantista Dokumentaro kaj literaturo.

2. Estas preparolita demando pri eldono de esperantaj Ŝlosiloj kaj Tutoj kaj aliaj propagandaj presaĵoj. La eldono de unuaj malhelpos malesto de presejo, povonta ilin presi en esta lingvo laŭ la internacia tipo.

3. Estas preparolita fondo de esperantaj konsulejoj en Revel.

4. Estas pritraktita enkonduko de ekzamenoj lingvaj.

5. Estas komencitaj antaŭlaboroj por ekskurso Finnlandon.

En la lasta komitata kunveno estas decidita kunvoki ĝeneralan kunvenon ven-

## Esperanto Eŝtimaal.

### Tallinna grupe.

Märtsi-kuus lõppes kursus, mille küllalt head tagajärjed olivad. Endised õpilased ilmutavad kestvat huviust rahvusvahelise keele kohta: nad harjutavad virgasti, lugedes ja grupe igareedestel koosolekutel käies. Nende koosolekute tulu on silmanähtav: grupe liikmete kõnelemisevõimalus ja väljarääkimine ilmutavad kiiret edu.

Viimasel ajal kuuldus grupe liikmete seas soovi — Soomemaal sõitu teha, sealseid aatesõpru kaema. Sõitu mõeldakse Neliplühi ajal, 1.—3. juulil, aurulaevaga Helsingisse, toime panna.

Komitee tegevusest jaanuari kuni märtsi kuudel teatame järgmist:

1. Algati läbikäimist Esperanto keskbürooga (Pariis) ja Möller ja Boreli raamatukauplusega (Berlinis), neilt korraliikult „Esperantista Dokumentara“ ja kirjandusliste uudiste saamiseks.

2. Harutati Esperanto „Šlosilo“, „Tuto“ ja muude propaganda trükitööde väljaandmise küsimust. Esimeste väljaandmist lastab see, et ei leidu trükikoda, mis neid rahvusvahelise algkuju sarnatselt trükkida võiks.

3. Kõneldi Esperanta asjatoimetajate seadmises Tallinnas.

4. Harutati eksamide seadmise küsimust.

5. Alustati Soome sõidu jaoks eel-töösi.

Viimasel komitee koosolekul otsustati peakoosolekut reedel, 25. aprillil, kell 9

dredon, la 25-n de aprilo je 9 horoj vespere, en kutima kunveno de grupo. La tagordo estas jena: 1. Partopreno en Internacia organizado; fondo de konsulejoj. 2. Elekto de revidanta komitato. 3. Priparolado pri ekskurso en Finnlandon. 4. Ekzamena demando. 5. Eldono de propagandaj broŝuroj, kovertoj kaj poŝtkartoj. 6. Diversaĵoj. — Ĉiuj grupanoj estas petataj partopreni de la ĝenerala kunveno.

*La komitato.*

### Ekster Revelo.

— **Esperanto Inter komparanoj.** Eĉ komparanojn interesas kaj varmigas la ideo de lingvo internacia. Tion ĉi vidis ni denove okaze de du paroladoj, faritaj dum lastaj monatoj en Estlandaj vilaĝoj. S-ro J. Rozenberg parolis la 30 decembron 1907 (la 12.1.1908) en paroĥo **Kolga-Jaani**, dum festeno de loka abstinencia societo, antaŭ pli ol 150 aŭskultantoj. La parolado klariginta necesecon de lingvo internacia, kaj speciale facilecon kaj taŭgecon de Esperanto, trovis atentan aŭdantaron; simile ankaŭ la deklamo de la poezio „Al la fratoj“ de Dr. L. Zamenhof. Estis esprimitaj deziroj, ke oni iam ankoraŭ parolu pri Esperanto. Multaj mendis lernolibrojn. Pli malfrue S-ro Rozenberg ricevis de tie leterojn, kun sciigoj, ke multaj junuloj fervore lernas Esperanton. — S-ro J. A. Rahamegi parolis la 16. (29.) marton en la lernejo **Rae**, proksime Revelon, pri ideo kaj ebleco de arta lingvo internacia. Parolado faris bonan impreson.

— **Pernov.** La 30. marton (12. aprilon) s-ro J. A. Rahamegi faris en Pernov, en societo „Endla“ paroladon pri internaciaj interrilatoj kaj pri artaj lingvoj. Post la parolado kaj diskutado estis decidita fondi grupon esperantistan. Tuj enskribis sin 18 personoj. Estis elektita provizora komitato, nome: S-ro Johann Kung, estro de privata progimnazio (Pernov, Riiŭtili uul. 51); S-ro J. Kustner (Pernov, Riia-Pskova ko-

